



Invito al Esperanto-sumoo, konkurso por legi Esperantajn librojn

HORI Jasuo

Sumoo estas japana tradicia luktarto. Nia Esperanto-sumoo estas ne lukto, sed konkurso legi Esperanto-librojn kune kaj internacie, en la sama periodo de la sumoo-luktado, nome 15 tagoj. En tiu ĉi konkurso, ĉiu partoprenanto mem decidas kiun libron legi, kiom da paĝoj legi, ĉiutage por sinsekvaj tagoj. Kiam la partoprenanto plenumis sian promeson en unuopa tago, tiu ricevos unu venkon. Tiamaniere tiu legadas ĉiun tagon dum 15 tagoj.

La 25a Internacia Esperanto-Sumoo okazis ekde la 10a ĝis la 24a de novembro 2013. En ĝi partoprenis 128 homoj el 24 landoj. Entute ili legis pli ol 12 000 paĝojn.

Tiu ĉi sumoo havas grandan signifon en Esperanto-movado.

1. Tiom da esperantistoj legas samtempe internacie. Tio certe naskas solidarecon inter esperantistoj en la mondo.
2. Precipe eĉ izolitaj esperantistoj povas partopreni internacie, do tio fortigas la movadon.
3. Ili legas tiom da paĝoj, do certe tio kontribuas al la libro-kulturo kaj Esperanto-literaturo.
4. Ok lernantoj partoprenis el Svisujo ĉi-foje. Tiu ĉi sumoo instigas junajn esperantistojn.
5. Ni kolektas recenzojn pri la libroj, kaj ili aperis en nia retejo. La nombro de

recenzoj estas ankoraŭ ne multaj (nun 28), sed se ni kolektados recenzojn, tio estos grava kaj valora trezorejo pri Esperanto-libro-kulturo.

Kiel iniciatinto de la sumoo, mi volas, ke

1. 500 homoj partoprenu.
2. Minimume 5 filioj fondiĝu en la mondo.
(Nun ni havas unu filion en Japanio, kiu prizorgas 15 partoprenantojn.)

En 2014 jene okazos Esperanto-sumoo:

La 26a sumoo 2014: jan. 12 – jan. 26

La 27a sumoo 2014: mar. 9 – mar. 23

La 28a sumoo 2014: maj. 11 – maj. 25

La 29a sumoo 2014: jul. 6 – jul. 20

La 30a sumoo 2014: sept. 14 – sept. 28

La 31a sumoo 2014: nov. 9 – nov. 23

Detalojn vi vidu en nia retejo:

[http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/
index.html](http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html)

Mi atendas vian partoprenon kaj kunlaboron.

HORI Jasuo (s-ro)

371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi,

Ootone 2-13-3

<hori-zonto@water.sannet.ne.jp>

(要約) エスペラントの学習方法として、
Esperanto-sumoo への参加を勧める。自分
で読む本とページ数を宣言して、大相撲の期
間に相当する15日間続ける。宣言どおり読
めたら「白星」をもらえる。 (堀 泰雄)